

# Raportas Kubo 8 novajn kazojn de Covid-19 kaj neniun forpason



Havano, jun 29 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi dimanĉo, oni konfirmis 8 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2340 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 89 pacientoj. Aliaj 61 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanato.

En tiu tago oni analizis 2210 samplajn, el kiuj 8 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 168 545 studitajn samplajn kaj 2340 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. Ses estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 88,4% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj. Unu kazo venis el eksterlando por totalo de 162 kontaktaĵoj eksterlande. El la totalo konfirmita 54,0% estis sen simptomaj.

El la 4 novaj kazoj 4 estas virinoj por 49,6% el la totalo. El la 2340 pacientoj diagnozitaj, 41 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 86, kun indikilo de morteco je 3,67% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 19 rilate la mortec-indikilon en la regiono kaj en la pozicio 99 en la mondo. Restas la nombro de du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 2211 jam rekuperiĝintaj (10 pliaj hieraŭ). Neniu paciento

estas en kriza a? grava stato.

?is sama dato la mondo akumulas pli ol 9 milionojn da konta?itoj pro tiu ?i malsano kun indikilo de morteco je 5,01 % dum la amerika regiono havas iom pli ol 50,0% el ?iuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmoj estas pli ol 4 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 4,85%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo la a?toritatuloj insistas pri la bezono plu gardi la fizikan izoli?on por eviti revigli?on de la nova kronviruso. Pri tio la havanaj a?toritatuloj pli strike kontrolas la sekurecajn regulojn epidemiologiajn.

En 13 kubaj provincoj oni ne raportis kazojn dum la lastaj du semajnoj kaj pro tio la lando ekigis la rekuperi?an etapon, escepte de Havano, kiu da?re raportas novajn kazojn de Covid-19.

---

<https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/227061-raportas-kubo-8-novajn-kazojn-de-covid-19-kaj-neniun-forpason>



**Radio Habana Cuba**